Norvega Esperantista Ligo

# Jarraporto 2023

Aprobota dum la landa kunveno 2025

## Ekstera informado

Ni havas retpaĝaron www.esperanto.no, kiun prizorgas Jardar Eggesbø Abrahamsen kaj Judith Parelie Abrahamsen. Ĝi enhavas ampleksajn informojn pri Esperanto norveglingve, sed ne estas ofte ĝisdatigita. NEL ankaŭ havas konton en Facebook, kie aperis kelkaj mesaĝoj, ĉefe ligitaj al kursoj.

La norveglingva informilo Esperanto-nytt aperis trifoje dum la jaro. Ĝi estas rete dissendita al membroj kaj aliaj interesiĝantoj, sed ne vaste distribuata. Redaktis Bård Hekland.

## Instruado

NEL aranĝis printempe retan kurson per Zoom, entute ok kursvesperoj. Estis 3-4 partoprenantoj. Instruis Marianne Lund. Marianne ankaŭ instruis rete tra la jaro grupon de kelkaj progresantoj.

## Kontakto kun la kluboj kaj la membroj

Okazis virtuala landa kunveno la 1-an de junio. Ĉeestis 13 membroj. La kunveno akceptis kelkajn statutŝanĝojn. La plej grava ero de la kunveno estis diskuto pri la estonteco de nia asocia ejo *Esperantonia*, surbaze de raporto prezentita de la estraro.

Eldoniĝis tri numeroj de Norvega Esperantisto. La unuan redaktis Douglas Draper, la duan kaj trian Claude Rouget.

Informoj dissendiĝis per la retpoŝta listo NEL-inform, kiun administras Jardar E. Abrahamsen. La estraraj protokoloj estis afiŝitaj en niaj retpaĝoj.

Laŭstatutajn jarraportojn sendis la kluboj de Tromsø, Oslo kaj Trondheim.

## Administrado

En la oficejo en Oslo ĉefe deĵoris Douglas Draper. La estraranoj troviĝas tra la tuta lando, kaj preskaŭ la tuta komunikado inter ili okazas rete. Okazis 9 retaj estraraj interkonsiliĝoj.

Herman Ranes en Trondheim asistis la oficejon en Oslo pri komputilaj kaj telefonaj praktikaĵoj, zorgante pri diversaj agordoj laŭbezone.

En 2023, NEL havis 3 aktivajn aliĝintajn klubojn: Oslo (40 membrojn), Tromsø (10 membrojn) kaj Trondheim (13 membrojn). Estis ankaŭ iom da aktivado en Rogaland kaj Bergen. La suma membronombro estis 95. El tiuj, 11 estis sub 35-jaraĝaj kaj 24 dumvivaj membroj.

Ne estis aktivado kadre de Norvega Junularo Esperantista.

En 2023 denove la ordinaraj elspezoj superis la enspezojn je pli ol 20 000 kronoj. Sed la saldo de la spezoj tamen fariĝis pozitiva dank'al du financaj enspezoj: unue preskaŭ 30 000 kronoj da profito de akcioj en Skagenfondene, kaj ĉefe malavara hered-donaco de Ester Olsen, je pli ol 190 000 kronoj. Tiu sumo estis metita al ŝparkonto en BN Bank. La financa rezulto por 2023 estis do profito je 199 072 kronoj.

Samtempe la estraro decidis simpligi la bilancon kaj kunfandi propagandan fondaĵon, studfondaĵon kaj domkonton kun la ĝenerala kapitalo. Temas nur pri librotenaj teknikaĵoj, kiuj havas nenian konsekvencon por la ekonomio de NEL.

La estraro ankaŭ sekvis proponon de la kasisto ĝisdatigi la valoron de Esperantonia en la bilanco. Nun aperas la valoro de Esperantonia, kalkulita de Skatteetaten. Tial draste kreskis la surpapera valoro de Esperantonia (de 97 667 NOK al 727 681 NOK) en la bilanco, kaj ekvivalenta sumo en la ĝenerala kapitalo. La revizoro aprobis la ĝisdatigon, kaj la bilanco je 31-a de decembro 2023 pli proksimas al financa realeco de NEL ol estis je 31-a de decembro 2022 (kaj antaŭe).

Legaco Rolf Uhlen ne disdonis subvenciojn en 2023. Je la fino de la jaro, ĝia kapitalo estis 1 034 940 kronoj. La legacan estraron konsistigis Herman Ranes (prezidanto), Judith P. Abrahamsen (kasisto), Ulf Lunde (estrarano), Bård Hekland kaj Leif Arne Storset (anstataŭantoj).

Ĝis la landa kunveno en junio la estraron de NEL konsistigis Bård Hekland (prezidanto), Jardar E. Abrahamsen (vicprezidanto), Marianne Lund (sekretario), Claude Rouget (kasisto), Lars Sandbakk (estrarano), Vidar B. Skretting (anstataŭanto 1) kaj Alexander H. Kvidbergskår (anstataŭanto 2).

En la landa kunveno estis reelektita la estraro, sen Vidar Skretting. Alexander H. Kvidbergskår ne partoprenis en la estrara laboro.

## Resumo

2023 alportis grandajn ŝanĝojn al nia asocio, ĉar nia multjara oficeja deĵoranto Douglas Draper ne plu povas fari tiajn grandajn servojn al la asocio kiel antaŭe. La estraro komencis organizi novajn rutinojn, kaj tiu laboro daŭros ankaŭ en la venonta jaro.

Pozitivaj estis la konstruaj diskutoj en kaj ekster nia landa kunveno pri la estonteco de nia ejo Esperantonia. La malavara heredaĵo de nia membro Ester Olsen fortigis la asocian ekonomion, sed ne solvas la longtempan tendencon de deficitoj.

Nia asocio havas tre limigitajn fortojn, ni devos utiligi tiujn fortojn efike, por ke ĝi daŭre provizu bazajn informajn kaj membrajn servojn en la venontaj jaroj.

La 1-an de majo 2025

La liga estraro

Bård Hekland, Jardar Eggesbø Abrahamsen

Marianne Lund, Claude Rouget, Lars Sandbakk